

Bibliaj Tagoj / Tago de Apostolo Mattiaso 2013

(dum sakramenta diservo je la 16a de marto 2013 en
Strasburgo)

Graco estu kun vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de
Jesuo Kristo, nia sinjoro. Amen.

Agoj 1, 15 - 26

Via vorto estu limilo por miaj piedoj kaj lumo por mia vojo.
(laŭ Ps 119, 105) Amen.

Kara gefratoj,

mi volas rakonti al vi pri la nova papo Teodoro la dua. Li
naskiĝis la kvaran de novembro 1952, studis kemion kaj
post sia studado ĝis al lia ekmembriĝo en monaĥejo en
1988 estris kemifirmaon apud Alexandrio. Post unu jaro li
estis konsekrita al sacerdoto, en 1997 al episkopo kaj
nun al papo.

Kelkaj el vi kun miro rigardas min. Ĉu vi ne aŭdis
pri Teodoro? Ĉu mi eraris pri nomo kaj persono? Nu, mi
eble klarigu al vi, kiel li estis elektita:

La nomojn de ĉiuj kapablaj kandidatoj oni skribis al lotoj. Tiujn oni metis dum solena diservo en ujon sur la altaro. Kaj nun knabeto kun binditaj okuloj elprenis loton, la loton de papo Teodoro la dua.

Tio nun ne estis sekreta informo el la „konklave“ en Romo. Mi nur forgesis mencii, ke mi parolas pri la elekto de la nova papo de la kopta eklezio en Egiptio kaj ne pri la posteulo de Benedikto la 16a en Romo.

Sed estas vero: Teodoro, kopte Tavadros la dua estis elektita la 4an de novembro 2012 je sia 60a naskiĝtago per loto kaj du semajnojn poste en la Katedralo de Sankta Marko en Kairo solene instalita kiel nova papo por preskaŭ 90 milionoj da koptoj en Egiptio kaj pliaj 15 milionoj en la cetera mondo.

Per loto li estis elektita. Speciale la juna generacio en Egiptio jubilis, ĉar li ne nur estas bona aŭskultanto kaj interparolanto, sed jam kiel episkopo aŭskultis la zorgojn kaj esperojn de la egipta junularo.

Tutsimile okazis la elekto de la apostolo Mattiaso tiutempe en Jerusalemo: unue la komunumo serĉis kapablajn kandidatojn, virojn, kiuj ĉion travivis kun la 12 apostoloj kaj povis atesti, kion Jesuo faris post sia

baptiĝo. Kaj kiel la restintaj 11 apostoloj, tiu novelektita apostolo estis atestanto de la releviĝo de de Jesuo.

2 taŭgajn kandidatojn oni trovis: Jozefon, nomatan Barsaban, kies alnomo estis Justus, do Justulo, kaj Mattiason. Pri ambaŭ ni ekscias malmulton. Pri Jozefo eĉ – kiel strange - pli ol pri Mattiaso. Tiam la komunumo preĝis kaj lasis decidi la lotumon. Tiumaniere Mattiaso iĝis unu de la 12 apostoloj.

Reen al nia tempo: Ĉu vi subtenus, se ekzemple ĉiu partio en la nacia parlamento kandidatigus unu kandidaton por la ofico de – ni diru - la franca prezidanto aŭ la federacia kanceliero kaj poste oni lotumus pri ĝi? Mi certe ne!

Eble se estas egaleco de voĉoj, decidu lotumado, sed ne tutan elekton! Ĉar tia elekto ja estus ege riska: Facile povus okazi, ke venkus kandidato, kiu en normala elekto tute ne havus ŝancon. Ĉe la koptoj la elekto ja bone sukcesis, Dank' al Dio! Sed kiu povas garantii, ke ne estis hazardo aŭ nura bonŝanco, ke kun Teodoro la dua estis lotumita la ĝusta viro en ĝusta momento?

En la evangelia eklezio kaj en la germana parto de la romkatolika eklezio ni celebras je la 24a februaro la

tagon de la apostolo Mattiaso. Kial? Kial ni rememorigu je tiu tago al apostolo, pri kiu ni preskaŭ nenion scias, krom la nomon kaj lian elekton per lotumado?

En sia letero al la eklezio de Romo sankta Paŭlo skribas:

Ne venĝu vin, amataj, sed cedu lokon al la kolero [mi aldonas: de Dio]; ĉar estas skribite: Ĉe mi estas venĝo, Mi repagos, diras la Sinjoro.
readmono 32, 35.

Rom 12, 19

Jen, kion ni povas lerni de Mattiaso: Cedu al Dio, donu al Dio via vivo. Doni spacon al Dio, tio certe ne signifas, esti maldiligenta aŭ nenionfarema kaj lasi ĉion fendan al Dio. Ĉar ja ankaŭ Petro, kiel ni aŭdis, nomis certajn kondiĉojn por kandidatoj:

El tiuj viroj do, kiuj nin akompanis dum la tuta tempo, en kiu la sinjoro Jesuo eniris kaj eliris intern ni, komencante de la bapto de Johano ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren for de ni, unu devas esti atestanto kun ni pri lia releviĝo.

Agoj 1, 21s

Postsekvanto de Jesuo, kristano bezonas sperton kun

Jesuo. Apostolo ne nur sciu la vivon de Jesuo laŭ onidiroj, sed kiel vidatestanto. Ankaŭ ĉiu, kiu volas sekvi Jesuon hodiaŭ, bezonas firman fundamenton. Li sciu, kion li kredas kaj kion ne.

Kion vi scias pri Jesuo? Ĉu vi povus kompreneble klarigi al viaj infanoj, najbaroj kaj ... al vi mem, kiu estas Jesuo, ... kiu estas Jesuo por vi? Se ne, ne estas tro malfrue. Vi povas nun komenci per lernado. Por junaj homoj ja ekzistas konfirmaciaj preparlecionoj. Tio estas ŝanco por ili. Kaj ĉiuj aliaj, speciale la pli maljunaj estas invitataj al kursoj, lecionoj aŭ renkontiĝoj kiel la Bibliaj Tagoj aŭ en siaj komunumoj.

Je la apostolo Mattiaso ni vidas, kiom gravas por kristano, pasigi tempon kun Jesuo.

Kie kaj kiel tio eblas por ni? Hodiaŭ, tie ĉi en la diservo ĉeestas la triunua Dio meze intern ni!

La komunumo tiutempe donis al Dio spacon. Kaj tial ili ne nur rigardis al homaj kondiĉoj kaj kapabloj. Ja ekzistas homoj, kiuj povus dum horoj instrui pri Jesuo el Nazareto, sed ne donas al Dio spacon en sia vivo.

Ĉar sole Dio vidas la korojn, tial preĝis kaj la prakomunumo de Jerusalemo kaj la kopta komunumo en

Kairo, antaŭ ol ili decidis ion kaj lotumis. Ĉar preĝi donas spacon al Dio en la vivo. Se mi preĝas, mi petas Dion, malfermi miajn okulojn por tio, kiun mi eble ne volas vidi. Mi petas Lin, gvidi min ankaŭ tien, kien min normalkaze eĉ ne povis tiri dek ĉevaloj.

Sed mi devas averti vin: Doni al Dio spacon kaj preĝi estas riska. Ni ja en la Patro nia preĝas: „Fariĝu Via volo“. Sed kiu garantias, ke Lia volo ankaŭ estas mia volo?

Donu al Dio spacon en via vivo!

Tial la komunumoj en Jerusalemo kaj Kairo lotumis. Ili tutkonkrete fidis, ke Dio kunludos tiun ludon, ke Li intervenos, ke Li agos.

Ankaŭ vi donu al Dio spacon en via vivo! Por ni tio signifas: Lernu de Jesuo, kion li faris kaj instruis. Lernu la fundamenton de via kredo. Preĝu, preĝu ĉiukaze antaŭ gravaj decidoj, ke Dio prenu spacon en via vivo. Kaj tiam permesu al Dio, vin surprizi, tra kiaj vojoj Li volas gvidi vin kaj al kio li vokos vin.

Donu al Dio spacon en via vivo!

Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardu

viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo, nia sinjoro.

Amen.

Adoru 507: Se nur al Dio vi konfidas